# ELF-AREK

**Esperanto-Ligo Filatelista**
**Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj**

**Prezidantino:**
**Elda DOERFLER**
**Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE**
**testudo.ts@gmail.com**

**Jen mia bankokonto:**
**IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta**
**BIC: BPPIITRRXXX Por: Elda Doerfler**
**UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx/r**
**Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00**
**Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidantinon.**
**Kunredaktantoj: James REZENDE PITON - sudastelaro@gmail.com**
**Albert BOON, Esperanto-Numismatika Asocio bert.boon@skynet.be**
**ELF-AREK ttt-ejo: www.kolektado.esperanto.cc**

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

## EKOLOGIA GLUMARKO EL 1931

Sendis ĝin nia dana samligano Jan Niemann. Prie li informas, ke ĝi troviĝas sur koverto sendita de Peruo al Svedio, en tiujara novembro. Nuraj scioj estas, ke ĝiaj mezuroj egalas al 46x62mm kaj ke temas pri kolora rastruma presaĵo. Nia amiko Jan aldonas; "Ĝi estas la sola ekzemplo pri E-lingva naturprotektada varbado glumarka, kion mi vidis ĝis nun!" kaj pri tio mi tute konsentas. Ĉu la membroj glumark-kolektantaj povas aldoni aliajn ekzemplerojn ekologitemajn? Estus interese por ni ĉiuj! Mi atendas senpacience belajn surprizojn!

ELDA




# LA VERDA LUPEO




**INFORMILO de ELF/AREK**

*Aŭgusto 2022* *54-a jaro* *N-ro 190*

*Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj*

**Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - BE-3300 Tienen**
**Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste**
**James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP**




Nove eltrovita: Esperanto sur kroata poŝtmarko!

**... kaj tiu ĉi ekzemplero estas via!**

## KARAJ GELIGANOJ!

La aŭgusta ekzemplero de LVL plenigas nin, la tri redaktantojn, je prava aŭ malprava (dependas de la vidpunktoj!) fiereco. Kial? Kompreneble ĉar ni sukcesis ĝin prezenti al vi belaspekta, enhavinteresa, surprizoriĉa! La fakto estas, ke neniam ni ricevas iun, eĉ etan, aprobvorton pri la LVL-enhavo, tial ni ne scias, ĉu ĝi renkontas vian aprobon aŭ ne. Proverbo tamen diras: '*silento estas konsento*', do ni daŭrigas laŭ la komencita vojo, kun espero ke ankaŭ ĉi-foje ni trafis nian celon: vian plenan kontentiĝon!

La kovrilo estas iom neordinara, ĉu ne? Bela bildo de oficiala poŝtmarko plus ĝia originalo! Ĝi estis trovita de ELF-AREK-ano Michel Basso, antaŭ ĉ. unu jaro, sed prie li informis nur antaŭ kelkaj semajnoj.

Ĉi-tie ĝia priskribo.

| | |
|---|---|
| **Lando** | **Kroatio** |
| **Serio** | **Festo de sankta Valenteno** |
| **Eldondato** | **4 februaro 2015** |
| **Temoj** | **Koroj / sankta Valenteno** |
| **Koloroj** | **Nuancoj de nigro kaj violo** |
| **Desegnisto** | **Ivona Đogić Đurić** |
| **Formato** | **48,28 x 40,54 mm** |
| **Nominalo** | **6,50 kunaoj** |
| **Eldonkvanto** | **100 000** |
| **Teksto** | **Plurlingva** |
| **Katalognumeroj** | **Mi: HR 1161; Yt: HR 1073; Cro: HR 983** |

Tre interesa, ĉu ne? Sed kial tiu aldono de la originala poŝtmarko? Tutsimple temas pri decido de via aŭtokrata prezidanto, kiu, konsiderante ke ĉi-jare ni festas la 55-an fondodatrevenon de ELF-AREK (pri tio ĉi atestas la

## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Elda DOERFLER - *Vortoj de via prezidanto* | 2 |
| Elda DOERFLER - *Ne tiom konata, sed … kia esperantisto!* | 5 |
| Albert BOON - *Zamenhofa miniaturo mezotinta* | 9 |
| Michel BASSO - *Iama membro de esperantista asocio iĝis Sanktulo!* | 11 |
| James REZENDE PITON - *Esperanto tra cenzuro (3ª parto)* | 14 |
| Elda DOERFLER - *El Odeso: malnovega poŝtkarto!* | 21 |
| Elda DOERFLER - *Ekologia glumarko el 1931* | 24 |






Ĉi-maldekstre ĝia foto: la samovaro estis starigita kiel propagandilo por la teo-fabriko el Moskvo - Московская чайная компания Караван. Fondita en 1893 fare de la germano Philip Maximilian von Wogau en Moskvo, ĝi




Vere ĉarma ĉi tiu bildkarto reklamanta la ekspozicion sed precipe la Pavilonon Esperanto. La kartoj ne plu estas troveblaj, eĉ la E-klubo en Odessa ne posedas ilin: granda bedaŭro pro tiu perdo! Koregе mi dankas s-inon Tatiana Mykhno, kiu donis al mi la permeson elpreni informojn pri tiu evento el la Odesa retejo, dum por havi kelke da pliaj klarigoj mi mem devis traserĉi, sen tiom grandaj rezultoj, tamen... sufiĉe kontentigaj!




Memorinsigno el arĝento pri la Artindustria ekspozicio en Odeso 1910.

Sur la tekruĉo legeblas la nomo de la moskva fabriko, kiu aperas ankaŭ en la nuntempa reklamo:
КАРАВАН
KARAVAN

РУССКИЙ КАРАВАН
• ВАШ ПУТЬ К ЧАЮ •

**Notoj**:
**1)** Aliloke, E. von-Füller (el *Ondo de Esperanto*, aŭgusto1910); **2)** Indikoj pri la mezuroj de la samovara alto estas tre malsamaj: 13 m, 20 m kaj fine 22 m. Mi elektis la plej grandan ciferon! **3)** En la tekstoj kursivaj estas kelkaj eraretoj, kiuj tamen ne ĝenas la komprenon, tial mi lasis ilin tiaj, kiaj ili estas en la originalo.

INDICE


| | |
|---|---|
| Elda DOERFLER - *Introduzione del vostro presidente* | 2 |
| Elda DOERFLER - *Non molto conosciuto, ma… che esperantista!* | 5 |
| Albert BOON - *Miniatura di Zamenhof a mezzotinta* | 9 |
| Michel BASSO - *Membro dell'associazione cattolica esperantista è stato proclamato Santo!* | 11 |
| James REZENDE PITON - *Esperanto attraverso la censura (3ª parte)* | 14 |
| Elda DOERFLER - *Da Odessa: una cartolina antica!* | 21 |
| Elda DOERFLER - *Chiudilettera ecologico del 1931* | 24 |